der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde der DDR im Deutschen Kulturbund

7. Jahrgang Nr. 50 November–Dezember 1971 30 Pf

La kvindeka

Jen ni havas kaŭzon jubilei. Nia revueto aperis en la 50-a numero. Jubileoj ĉiam instigas retrorigardi. Ĉu ni realigis niajn aŭ viajn intencojn, plenumis la neceson kaj la dezirojn? Ni malfermas do la diskuton kaj vi ĉiuj estas invitataj. Unue ni demandu nin pri la funkcio de la revueto, ĉar de ĝi dependas ĝia enhavo.

El ĝia subtitolo evidentiĝas klare, ke temas pri informilo por la GDR-esperantistoj, do ne estas internacia ĵurnalo kvankam multaj eksterlandaj esperantistoj ĝin regule ricevas, ne malofte laŭdante ĝian enhavon. Kaj evidente ni ja klopodas liveri kontribuojn de iom da internacia intereso.

„der esperantist" vere devas plenumi malfacilan taskon. Ĝi estu interesa kaj por sperta esperantisto kaj por la komencanto, kaj por enlanda kaj por eksterlanda esperantisto. Krome ĝi, ne laste, ankaŭ ion donu al la multaj neesperantistaj germanaj funkciuloj, kiuj organize subtenas nian laboron en la distriktoj kaj subdistriktoj. Ofte oni forgesas tiun gravan funkcion. Ni tial de tempo al tempo publikigas certajn informojn kaj artikolojn en la germana kaj kompreneble regule ricevas la protestojn de la „ĝisostuloj".

Ni iom diru pri la enhava profilo. La ĉeftasko plenumenda de „der esperantist" estas la gvido kaj fekundigo de la politika-ideologia kaj faka agadoj de la esperantistoj de GDR. Ĝi do ne estas unuavice kursmaterialo! Ni ne kaŝas la fakton, ke ni klopodas nin strikte bazigi sur marksisma-leninisman bazon. Tial ni vidas unuecon inter ideologia kaj faka laboroj. Tial ni certas, ke esperanto devas servi al la socio, sed ne al iuj utopiaj ideoj, sed al la solvo de la ĉeftaskoj, kiujn la socialisma socio frontas. Isoliĝo kiel iu verda familio tion certe ne ebligus. Kaj kiu atente legas la gazeton konstatas, ke ni atentas certajn tradiciojn de la esperanto-movado. Sed ankaŭ ĉirilate ne eblas mekanike transpreni ion sed devas atenti la hodiaŭon. Kaj ĉu necesas argumenti pri la neceso ne nur platone rilati al MEM sed dediĉi al ĝi dignan lokon? Kaj certe ankaŭ nin ĉiuj rilatas Vjetnamio. Tial ankaŭ pri ĝi kaj ĝia batalo, la aktiveco kaj agado de niaj tieaj kamaradoj „der esperantist" regule raportas. Elektante el la multo de la publikigindaj informoj pri la internacia esperanto-movado, ni kom-

preneble unuan lokon donas al la laboro de la esperantistoj en Soveta Unio kaj la aliaj frataj socialismaj ŝtatoj. Ne ekzistas por ni du politikoj: esperanta kaj ŝtata. Neglektante la „verdajn“ informojn ni klopodas raporti pri tiuj enlandaj agadoj, kiuj havas modelan karakteron, imitindas kaj respegulas reagojn je niaj intencoj.

Kompreneble oni povas konstati la evoluon de nia gazeteto tra kelkaj periodoj. Ni lernas kaj plue lernos kaj tute ne estas kontentaj. Sed fakto ankaŭ estas, ke ni klopodas plibonigi la fakan laboron, publicante artikolojn kaj seriojn pri leksikologio, metodiko, stilistiko literaturo. Ja estas danĝera eraro kredi, ke bona ideologia laboro nacie kaj internacie eblus sen alta faka nivelo. Strange, sed ekzistas esperantistoj, kiuj tute ne komprenas la valoron de scienca laboro. Kompreneble ni konscias, ke danĝero de sekeco de nia revuo povas ekzisti. Ni tial ankaŭ „enmiksas“ filatelon, distron kaj similan. Eventuale ni instalos ŝakangulon.

Sed jam evidentiĝis post la dirita, ke ege malfacile estas „subĉapeligi“ ĉies dezirojn. Plej invititaj estas tiuj deziroj kaj proponoj, kiuj estas ligitaj kun taŭga materialpropono.

Kompreneble ni scias pri multaj solvendaj problemoj. Necesas facilaj legaĵoj por komencantoj kaj kursoj kun metodikaj helpoj. Pli da metodikaj helpoj por pedagogie neinstruitaj kursgvidantoj. Kaj la junulara paĝo? Ĝi ofte mizeras. Kompreneble ankaŭ ĝustas la kritikoj pri manko da ilustraĵoj k.t.p.

Plue ni ja bezonus pli da numeroj jare, pli da paĝoj, pli da ... k.t.p. Sed tiuj lastaj ofte aŭditaj postuloj vere, bedaŭrinde, ne estas realigeblaj.

Ni pli volonte bonvenigas ĉiun taŭgan kontribuon ol skriba kritikado kaj postulado de neplenumigeblaĵoj. Vi ja scias „Tiom da homoj, tiom da gustoj”. Sed tute certe ni ankaŭ en la estonto atentos la saĝajn rimarkojn de Lenin pri gazeto kiel kolektiva organizanto. Sed, karaj legantoj „inter faro kaj rakonto, staras meze grando monto“. Do faru, kunfaru nian organon ankoraŭ pli interesa.

La redakcio

---

300 junaj esperantistoj tendumis ĉe Kievo

La 13-a Sovetia Esperanta Junulara Tendaro (SEJT-13) okazis de la 28-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto apud Kievo, ĉe la rivero Dnipro, en pinarbaro. Ĝin organizis Sovetia Esperanta Junulara Movado (SEJM) kaj Esperanto-klubo de la Kieva politeknika instituto. La tendaron partoprenis 270 sovetianoj kaj 30 eksterlandaj gastoj el Hungarujo, Pollando, Bulgarujo kaj Vjetnama Demokratia Respubliko.

En la Programo de la tendaro elstaris: pedagogia seminario (kun ekzameno C); paroligaj kursoj (kun ekzameno B); scienca seminario kun raportoj pri originalaj esploroj; fakaj kunvenoj; festo de Neptuno; koncertoj (ukrajna, siberia, urala, balta, centro-rusa kaj de lokaj studentoj-nacilingve); diskuto „Esperanto kaj scienco“.

Von der Sitzung des Zentralen Arbeitskreises Esperanto am 25. und 26. September 1971

In Vorbereitung des VIII- Bundeskongresses

Die für dieses Jahr letzte Sitzung des ZAK war der Auswertung der Weltkongresse in London und Edinbourgh, sowie einigen Fragen der innerorganisatorischen Demokratie gewidmet. Zu Beginn der Tagung würdigte der Vorsitzende des ZAK, Bundesfreund Rudi Graetz, das Viermächteabkommen über Westberlin, das besonders durch die Initiative der SU zustande gekommen ist. Er wertete weiterhin die letzte Tagung des Präsidialrates aus und ging besonders auf den Entwurf über die weitere Arbeit des DKB bis zum VIII. Bundeskongreß ein.

Ehe Bundesfreund Graetz den Bericht über das Auftreten der DDR-Delegation auf dem 56. Esperanto-Weltkongreß in London gab (vgl. deutschsprachiger Bericht in „der esperantist" Nr. 49) zeigte der Vorsitzende den Mitgliedern des ZAK ein bewegendes Freundschaftsgeschenk der vietnamesischen Esperanto-Freunde aus Hanoi: eine rote seidene Fahne, die mit Goldstickerei versehen, der Freundschaft zwischen den Esperantisten der DDR und Vietnams gewidmet ist. Auch die aus USA-Artilleriegeschossen angefertigten Pokale waren dem ZAK gewidmet. In einem Schreiben an den Vietnamesischen Verband, unterzeichnet von allen Anwesenden, dankte der Zentrale Arbeitskreis für dieses wertvolle Geschenk der Freundschaft und versicherte dem vietnamesischen Volk auch in Zukunft seine Solidarität und Unterstützung im Kampf gegen den USA-Imperialismus und seine Helfer.

Das Auftreten der DDR-Delegationen in London und Edinbourgh, die Berichte gaben Rudi Graetz und Dr. Hans Eichhorn, fand die Billigung des ZAK. In einem prinzipiellen Beitrag skizzierte der Sekretär des ZAK, Bundesfreund Detlev Blanke, einige Perspektiven der internationalen Arbeit der Esperantisten der DDR und leitete damit eine interessante Diskussion ein.

Es wurde u. a. herausgearbeitet:

a) *Die Zusammenarbeit des ZAK mit nationalen und internationalen Esperanto-Organisationen erfolgt einzig und allein in Übereinstimmung mit den Prinzipien der Außenpolitik der DDR.*

b) *Die Zusammenarbeit mit nationalen und internationalen Verbänden geht über den ZAK.*

Von besonderer Bedeutung für die weitere Durchsetzung der sozialistischen Demokratie in den Gruppen und Leitungsgremien der Esperantisten im DKB war der knappe und sehr konstruktive Beitrag von Bundesfreund Graetz zu diesem Thema. Kernfragen dieses Beitrages könnten wie folgt formuliert werden:

1. In unserer Arbeit müssen wir stets davon ausgehen, daß in den Gruppen des DKB Bürger mit verschiedenen Weltanschauungen und politischen Auffassungen zusammen wirken. Das erfordert eine kluge und sehr differenzierte Arbeit mit den Menschen, die in der ideologischen Arbeit genauer berücksichtigt werden muß. Wir wollen jeden gewinnen und keinen zurücklassen.

2. Der Wert ideologischer Auseinandersetzungen wird in erster Linie am Ergebnis gemessen. Es ist nicht möglich, Grundsätze und Erfahrungen aus den 20er Jahren mechanisch auf die Gegenwart zu übertragen.

3. Es gilt, alle Freunde, Veteranen oder Anfänger, mit abrechenbaren Aufgaben zu betreuen. Das bedeutet, besonders die Jugend zu fördern.

4. Fruchtbare Arbeit mit konkreten Ergebnissen kann nur geleistet werden, wenn eine enge Zusammenarbeit zwischen Kreis- und Bezirksleitungen des DKB und den ehrenamtlichen Leitungsgremien der Esperantisten zur Selbstverständlichkeit geworden ist.

5. Jeder Esperantofreund hat ein Recht darauf, ausführlich über die Sitzungen und Beschlüsse des ZAK informiert zu werden. Dafür haben in erster Linie die BAK-Vorsitzenden Rechnung zu tragen. Regelmäßige Sitzungen des gesamten Bezirksarbeitskreises, die einer genauen Auswertung der ZAK-Sitzungen dienen müssen, sind daher unerläßlich.

6. Rechte und Pflichten bilden eine unlösbare Einheit. Beschluß und Plandisziplin muß auch zur Gewohnheit aller Leitungsgremien der Esperantofreunde werden.

7. Zu weiterer Vervollkommnung der innerorganisatorischen Demokratie werden die Esperantisten 1972 die jeweiligen Leitungsgremien bis zum Zentralen Arbeitskreis wählen. Dabei geht es nicht um Fragen einer formalen, sondern der sozialistischen Demokratie. Entsprechende Direktiven werden bis Ende 1971 vom ZAK erarbeitet.

8. Der Entwicklung neuer, möglichst junger Leitungskader, die über ein hohes staatsbürgerliches Bewußtsein und gute Fachkenntnisse verfügen, ist erhöhte Aufmerksamkeit zu schenken.

Die den Ausführungen des Vorsitzenden folgende Diskussion kann als guter Beitrag zur Vorbereitung des VIII. Bundeskongresses gewertet werden. e–

DDR-Esperanto-Film in Hanoi

In einem Brief vom 25. Juni 1971 schreibt der vietnamesische Esperanto-Verband an den ZAK u. a.:

„Diesen Film haben das erste Mal mehr als hundert Mitglieder des Hanoier Esperanto-Klubs gesehen, wo er wegen seiner perfekten Darstellung und seinem ausgezeichneten Inhalt begeisterten Beifall erhielt. Es werden ihn somit tausende vietnamesischer Esperantisten im ganzen Lande sehen und außer ihnen viele tausende von Nichtesperantisten in einer aus dem Esperanto angefertigten Übersetzung. Liebe Genossen, nehmen Sie unseren großen Dank für das Geschenk entgegen und auch darum, daß Sie es uns so gastfreundlich ermöglicht haben, eine angenehme Reise durch das wunderbare brüderliche Land zu machen, das erfolgreich den Sozialismus aufbaut und in eminenter Weise zur Festigung des Friedens in Europa und in der Welt beiträgt ...“

Deutsch-vietnamesische Freundschaft



Die Kontakte zwischen Esperantisten der Deutschen Demokratischen Republik und der Demokratischen Republik Vietnam sind seit Jahren sehr eng und vielseitig.

Geldspenden sowie Sachwerte sind von Esperantisten der DDR dem Solidaritätskonto überwiesen bzw. durch die Botschaft der DDR in Hanoi dem Vietnamesischen Esperanto-Verband zur Verteidigung des Friedens übergeben worden (VPEA). VPEA genießt in der DRV hohe Anerkennung.

Zu den besonderen Förderern von VPEA gehören u. a. der Minister für Kultur Hoang Minh Giam und für Volkbildung Nuyen Van Huyen.

Der Vorsitzende des Verbandes ist Nguyen Van Kinh, der lange Zeit Botschafter der DRV in Moskau war. Genosse Van Kinh gehörte der Parteidelegation der DRV zum Parteitag der KPČ dieses Jahres an.

VPEA begeht 1971 sein 15jähriges Jubiläum. In dieser Zeit wurden in Zusammenarbeit mit dem Fremdsprachenverlag über 60 Titel (oft jeweils mehr als 300 Seiten stark) in Esperanto herausgegeben: Romane, Novellensammlungen, Gedichte Dokumentationen. Sie sind zum großen Teil nicht in deutscher Sprache erschienen und beschreiben den heldenhaften jahrzehntelangen Kampf des vietnamesischen Volkes gegen seine Unterdrücker, früher der französische und heute der amerikanische Imperialismus.



Der ZAK erhielt als Freundschaftsgeschenk vor kurzem eine rote, seidene Fahne mit der goldgestickten Inschrift „An Zentraler Arbeitskreis Esperanto der DDR
Es lebe die vietnamesisch-deutsche Freundschaft!
Vietnamesischer Esperantoverband zur Verteidigung des Friedens 1971“

Außerdem waren dem ZAK zwei aus amerikanischen Artilleriegeschossen gefertigte Pokale gewidmet.

NIVEA

Marto 1933

Mi devis al suda parto de Berlino, do veturi preskaŭ tra la tuta urbo. Jam survoje al la trama haltejo trafis min la unua ŝoketo. Apuda strato estis riglita de SA[1]). Ĉiuj pasantoj inter la SA — ĉenoj estis zorge ekzamenitaj laŭ identeco kaj enhavo de poŝoj, tekoj kaj pakaĵoj. Mi jam loĝis klandestine kaj tia hazardo povus esti la fino.

Akurate, preskaŭ samtempe, alvenis ĉe la fina tramhaltejo Adolf, kiu bone sciis la vojon al tiu ĝardeneto, unu inter multaj miloj, kiu estis nia celo. Ni bone atentis la ĉirkaŭon por eniri nerimarkite. Loĝis tie kamarado kun sia edzino, kiujn mi ne konis. Adolf klarigis:

„Ni bezonas la aparaton."

„Mi enterigis ĝin."

„Kie?"

„Jen, inter la heĝoj."

„Do, elfosu ĝin, ni tuj devas kunporti ĝin."

Adolf kaj mi memkompreneble restis en la dometo, por ne esti rimarkataj de najbaroj. La kamarado singarde, tamen haste fosis. Kelkfoje li devis veni por alporti unuopajn partojn de la dismuntita multobligilo.

Ĝi estis nia kara, valora aparato, per kiu ni en la pasintaj monatoj kaj jaroj en Dircksenstrato, en la buroo de GLEA kaj IPE[2]) fabrikis tiom multajn ekzemplerojn de PEK-bultenoj, ESPERANTO PIONIRO[3]) kaj cirkuleroj. Kiam evidentiĝis, ke venkos la faŝismo, ni dismetis la plej bonajn ekipaĵojn de nia buroo en sekurajn lokojn. Kiel supozite, post kelkaj semajnoj la faŝistoj, kiam ili traserĉis la buroon, estis kontentaj trovi la reston, kredante, ke ili sukcesis surprizi nin.

Ni nun metis ĉiujn partojn en grandan dorsosakon. Montriĝis, ke unu parto estis tiel longa, ke ĝi ne estis tute kaŝebla en la sako. Sed kion fari? Ja nur bonaj fakuloj povus rekoni tiun ferajon kiel parton de multobligilo. Iomete ĉagrene ni elŝteliĝis el la dometo, el la ĝardeno kaj per kutima marŝritmo reiris al la tramhaltejo.

Kia malŝanco! Kelkajn sekundojn antaŭ nia alveno tramo ekforveturis. Nun ni devis stari bone ekspozite en ĉi tiu soleca loko ĉirkaŭ kvaronan horon. Tamen, ĝi pasis sen ia ĝeno. Fine ni kontente povis entramiĝi. Mi metis la dorsosakon kun la „varmega" enhavo sur la platformon kaj ni mem sidiĝis interne. Ĝis nun ĉio bone evoluis. Ju pli ni veturis en la urbocentron, des pli pleniĝis la tramo. Post duonhora veturo ĝi strange longe haltis. Ekestis ia maltrankvileco. Diablo! Ekstere svarmis SA-anoj. Ni rimarkis, ke antaŭ nia tramo staris longa vico da aliaj. Ni estis enriglitaj, ankaŭ la pasaĝeroj de la tramoj estis traserĉataj. Ne plu eblis, forlasi sian lokon. Timo ekkaptis min. La stomako strange doloris. Kion nur fari nun? Ni ne kuraĝis interparoli. Plej bone, ke neniu rimarku, ke Adolf kaj mi apartenas kune. La pakaĵo staris ekstere, sed tio nur estis malforta konsolo. Febre mi meditis sen trovi racian penson. Pasis duona horo. Ĝi ŝajnis senfina.

Sed kio nun? Trama sonorado. La SA-anoj kaj la homamaso disiris. Ne plu estis rigloj el SA-anaj ĉenoj. Nia tramo ree la unua libere povis pasi! Kia bonŝanco, ke ni maltrafis je sekundoj la antaŭan!

En Veding[4]) necesis iri ankoraŭ kelkajn minutojn. Preskaŭ ĉe la celo, en Humboldt-bosko, venis renkonten al ni Ernst. Ni tuj sentis novan danĝeron.

„Atendu momenton! Ne eblas veni al ni.“

Konsternite ni nur per la okuloj demandis la kialon.

„Vi scias, mia edzino baldaŭ devos naski infanon. Ŝi ne bone fartas. Ni hodiaŭ estis ĉe la kuracisto. Li ordonis nepran trankvilecon, nenian emocion! Se vi laborus en la ĉambreto ... ŝi freneziĝus pro timo.“

„Sed tio ja ne eblas nun! Kien ni iru kun la aparato?! Kaj nur vi havas tiel idealan kelan loĝejon, el kiu la bruoj de la aparato ne estas aŭdeblaj de la najbaroj.

Ni ne povas konversacii ĉi tie longe kun nia pakaĵo sen esti arestataj! Lasu nin almenaŭ unue demeti la aparaton, ĝis ni trovos alian solvon!“

Ne eblis. Li kategorie rifuzis, lasi nin en sian loĝejon. En tiaj cirkonstancoj bona konsilo estas rara. Kion fari?

Mi ekmemoris: „Tre proksime, Brunnenstrato 99 loĝas Hans Ŝvendi. Ĉu ni provu?“

Ne restis alia elekto. Ni sidiĝis sur benkon, metinte la dorsosakon iom kaŝite post ĝin. Adolf restis tie, legis gazeton, mi iris al Hans.

Hans Ŝvendi venis al ni nur antaŭ 1½ jaroj. Modesta, inteligenta junulo. Sed el tute alia medio. Ni ĉiuj estis laboristoj, preskaŭ ĉiuj senlaboraj, baraktante en mizero. Li, Hans, estis filo de posedanto de granda Berlina kvaretaĝa, plurkorta loĝdomo, et-entreprenisto. Hans foje trovis en la subtegmento inter aliaj paperoj E-lernolibron. Kun sia amiko li lernis tiun ‚sekretan lingvon'. Nur longe poste hazarde li kontaktiĝis kun unu el ni. Hans montriĝis bona esperantisto, ĝentila homo, tiel saĝa, ke li ne nur ekkonis la valoron de E, sed tuj interesiĝis pri niaj politikaj celoj kaj fariĝis bona kamarado.[5])

Mi trovis lin hejme. Kia ŝanco!

Li estis sola. Kia feliĉo!

Haste mi informis lin pri nia situacio. Momenton li meditis kaj tiam hezite diris: „Ja, kion fari? La problemo estas, ke mia frato estas SA-ano. Vi povas imagi la atmosferon en la familio! Mi mem ne scias, kiom kapablus fiagi mia frato kontraŭ min. Mi ankaŭ ne povas paroli kun li pri tiaj aferoj. Hm ... sed vi ja ne povas resti sur la strato. Ni devas riski.“

Kia solvo! Mi reiris al Adolf, sidiĝis sur la benko. Preteriris la pasantoj. Adolf foriris kaj baldaŭ mi reprenis la dorsosakon kaj reiris al Hans. Li pasis antaŭ mi tra la pordego, mi sekvis lin en la kelon. Ĝi estis mallarĝa kamero, duone plena da karbo, luko al la strato. Li lumigis la kelon per kandelo. (Ankoraŭ ne estis la tempo, kiam en ĉiuj kromlokoj de la domoj estis elektra kurento.) Li foriris, mi muntis la aparaton. Feliĉe mi bonege konis ĝin, ĉar ofte antaŭe mi luktis kontraŭ ĝiaj diablaĵoj. Fine, post ĉirkaŭ du horoj, mi povis meti la matricon. Revenis Hans. Mi komencis provi la unuajn ekzemplerojn — reklamo por NIVEA — tiel ekstere, interne niaj unuaj raportoj pri la faŝisma realeco en Germanio, destinitaj al niaj kunbatalantoj en la tuta mondo.

Nova ĝeno: la aparato klik-klakis ĉe ĉiu ekzemplero. Antaŭe tio tute ne ĝenis min. Ĉi tie en la kelo tio sonis kvazaŭ perkutinstrumento. Antaŭ la domo ĉe la pordego, proksime de la luko, klaĉis du virinoj el la domo. Kiom da tempo ili havis! Hans timis, ke ili povus aŭdi la klik-klakon. Al li tute ne venis la penso, ĉesigi la laboron. Li simple iris al la virinoj kaj kunklaĉis, zorgis, por ke neniam estu interrompo. Li, al kiu tia okupo estis tute fremda, kiu eĉ ne konis multajn el la domanoj! Mi admiris Hans kaj aŭtomate turnis la krankon.

Subite iu provis ŝlosi, venis en la kelokameron, ekmiris. En la mano sitelo por deporti karbon. La frato de Hans. Ree tiu sento en la stomako.

„Bonan tagon!“ mi diris, kvazaŭ mia ĉeesto estus la plej natura afero en la mondo. Li iom konsternite respondis: „Bonan tagon!“

Mi daŭrigis mian laboron, li plenigis sian sitelon kaj ree foriris.

Kion fari? Kio nun sekvos? Ĉu li alarmos tuj sian SA-taĉmenton? Ĉu li konsideras la sekvojn por sia frato, por sia familio? Ĉu forrapidi, antaŭ ol estus tro malfrue? Mia laboro ne estis finita!

Tiel baraktante mi elĵetigis folion post folio sen povi decidi ion. Fine la lasta folio. Mi ankoraŭ kaŝis la aparaton inter la demetitaj objektoj kaj tuj poste preterpasis Hans kun la du virinoj. Kaptis min la malluma Humboldt-bosko.

L. Schödl

Komentoj

[1]) *SA = faŝisma ataktaĉmento*

[2]) *GLEA = Germana Laborista Esperanto Asocio*
IPE = Internacio de Proleta Esperantistaro

[3]) *PEK = Proleta Esperanto Korespondado — aperis E-lingva bulteno kun informoj pri eventōj en la lando, destinita al eksterlandaj kamaradoj kaj nacilingva bulteno kun informoj el nia eksterlanda E-korespondado.*
ESPERANTO PIONIRO estis revueto por niaj E-infangrupoj

[4]) *Wedding = laborista urbkvartalo*

[5]) *Hans Schwendi devis soldatiĝi kaj pereis en la milito.*

Rim de red.:

Kiel delegitoj de GDR, ni ĉijare en Londono havis la ĝojon persone konatiĝi kun malnova laborista esperantisto, k-do Bill Keable. Li montris al ni unu „Nivea-Kajereton“ kun la poŝta stampo el Berlin.

Utila renkontiĝo en Moskvo

La 24-an de oktobro 1971 en la Moskva Kulturdomo de medicinistoj laŭkutime okazis la dimanĉa laborvespero de Moskva Internacia Esperanto-Klubo. Tamen la vespero estis elstara por ni ĉiuj, ĉar ĝin partoprenis niaj gastoj, samideanoj kaj pacamikoj — kamaradoj Nikola Aleksiev, la prezidanto de MEM kaj BEJ, kaj Rudi Graetz, la prezidanto de CLR Esperanto de GDR.

K-do Aleksiev rakontis al la ĉeestintaro pri la agado de MEM, pri ĝiaj kontaktoj kun la Tutmonda Packonsilantaro, kaj pri la vastiĝanta agnosko fare de la Tutmonda Packonsilantaro de la utileco de peresperanta porpaca laboro. K-do Aleksiev klarigis, ke la ekzistanta organiza formo de MEM kiel movado permesas al esperantistoj de diversaj socisistemoj kaj mondkonceptoj partopreni la porpacan agadon ne estante membroj de speciala organizaĵo. Tiu formo donas eblecon fari porpacan laboron en la kadroj de ĉiuspecaj kaj ĉiudirektaj E-organizaĵoj kaj ne apartigas la porpacan peresperantan agadon de la ĝenerala esperantista agado. *K-do Aleksiev substrekis ankaŭ, ke la porpaca agado, sekve partopreno en MEM, estas la ĉefa, memkomprenebla tasko por ĉiuj socialismlandaj esperanto-organizaĵoj, kio estas la natura sekvo de la ĝenerala ekstera politiko de la socialisma ŝtato.*

(Daŭrigo pĝ. 10)

Esperanto-tendaro en Rabenstein



La tendumejo situas sur arbarkovrita montopinto de la periferia urboparto „Rabenstein“ en Karl-Marx-Stadt. Altaj, centjaraj fagoj ĉirkaŭas la idilian arbaran herbejon. Rubando ĉe la enirejo inter arboj substrekas, ke ni estas ĝustaloke, en la *2-a internacia tendaro de la E-Junularo de GDR.*

En granda duonrondo sur la tendumejo trovis lokon dekduo da belaj kaj komforte ekipitaj tendoj. Ni formetas nian tekon kaj iom ripozas sub tiu blua ĉielo, el kiu ridis al ni la suno dum la tuta tempo de la tendaro. Pura kaj arbarodora aero plezurigas niajn pulmojn. Impona panoramo de la tuta urbo sin etendas antaŭ niaj okuloj, en kiu loĝas 300 000 da civitanoj.

Dum la sekvantaj tagoj nin atendas abunda kaj interesa programo: *sportaj konkursoj en la subĉiela banejo kaj sur la arbara sportplaco, tuttaga migrado tra la intermonta valo „Stelmuelilo“ al la fama kastelo „Augustusburg“.* Tie ni i. a. vizitis la motorbiciklan muzeon. Alitage ni frosttremas en la *subteraj grotoj de Rabenstein kaj* vizitas la *Kastelon de Rabenstein.* Kompreneble okazas la kutima *promenado tra la urbo.* Fremdulgvidanto flulingve rakontas pri la historio de tiu ĉi urbo, kiu ĝis en la jaro 1953 portis la nomon „Chemnitz“. Li rakontas pri la planoj de la urb-projekciistoj kaj pri la „Kapo de la proletaro“, *granda monumento pri Karl Marx,* kiu havas sian lokon en la centro de la urbo. La monumenton kreis dum sesjara laboro profesoro Lev Kerbel, gisis ĝin la laboristoj en Leningrad por la laboristoj de Karl-Marx-Stadt. Okazas amika renkontiĝo kun cento da sindikatanoj dum komuna kultura vespero. Plue: Lumbildoj filmoj, diskutoj, kantoj, ludoj, promenadoj, lingva perfektiĝo. *Kaj ne laste interesa sabato kun raportoj pri UK en Londono, TEJO kaj efika junulara aktivado. 52 partoprenantojn* ni nombras, inter ili *gastoj el Bulgario, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando.* Inter ni vizite ankaŭ nia kara *veterano Otto Bässler kun edzino kaj liaj hungaraj E-kamardoj.*

Notinde por niaj posteuloj la vizito en la *folklortipa „Draŝejo“.* Hungar-germana gastronomia duopo Nyerges-Buri el nia tendaro preparis hungar-manieran kaldronan gulaŝon. Post formanĝo de ĉi inferaĵo la soifo subite ekŝvelis. Lerte, sperte kaj rapidpaŝe tiu hungar-germana duopo kapablis parte estingigi per hektolitro da biero kaj baterio da „rusa akvo“ la hororan soifon. Laŭdire ĉiuj niaj amikoj retrovis la vojon al la tendaro.

La *adiaŭa vespero,* impone aranĝita, estis ekskvizita pruvo pri la organizaj kapabloj de la amikoj en Karl-Marx-Stadt. Jam dum la tuta posttagmezo esperantistaj labordevigitoj el la apuda arbaro alportis arbon post arbo. La „verdstela fajrobrigado“ faris abundan preparon. La fajrobrigadistoj alportis amason da akvo-siteloj al la loko de la tendarfajro. Akvo tial, ĉar la *longedaŭra sek(s)periodo* provokis minacon de arbarbrulo.

Vespere: *Tendarfajro, kantoj kun nia gdr-majstro Deke el Dresden,* dancoj laŭ „Hoki-koki“, dancoj laŭ bulgara „Raĉenica“, bierumado, ventetoj, rapida sitelumado de la fajro, fajro foŕ, nokta nigro, momento da silento, subita infera kaj kaosa bruo en la aero, brilegaj fulmoj, tondregoj, hurikano, rapidkurego al direkto, kie supozeble troviĝis la tendoj, fulmoj lumigas la adiaŭvesperan ceremonion: Tabloj, kofroj, tendoj kaj ... la pantalonoj de Lehmann super niaj kapoj aerekskursas, por kelkaj do restis sen rezulto tiu rapidkuro al la tendo. Kulminpunkte sub nervotira bruo sin metas tri arbogigantoj inter niaj tendoj. Tendarestro Meusel deklaras: ĉio organizite.

Resume: Dietrich Meusel kaj liaj amikoj en Karl-Marx-Stadt bone laboris. Dankon al tiu junular-aktivo pro ilia laboro. Unuafoje la E-junularo de GDR kunvenis dum pli longa tempo. Ni reciproke konatiĝis, amikiĝis, formis „grandfamilion“, aŭ pli bone: kolektivon, kiu en sekvontaj jaroj formas la kernon kaj avangardon por la junulara laboro en GDR.

Kien 1972? Tutcerte ni partoprenos la TEJO-kongreson en Torun, kiu okazos sub la moto: „La junularo kaj la tria mondo“. Sed ankaŭ en GDR ni denove okazigos tendaron por niaj junaj geamikoj. Jam nun prepariĝu!

Buri

(sekvo de pĝ. 8)

K-do Rudi Graetz estis revenanta el la frata Mongolio, kaj ĉi-okaze salutis la kunvenintojn en la nomo de la mongolaj esperantistoj, kaj en la nomo de niaj samideanoj el GDR. Li rakontis pri siaj renkontiĝoj kun mongolaj esperantistoj, pri siaj priesperantaj raportoj faritaj en kelkaj mongolaj organizaĵoj, kio, laŭ la opinio de mongolanoj, ludos gravan rolon en plivigligo de la esperanta movado en Mongolio.

K-do Graetz rakontis al la moskva esperantistaro pri la porpaca kaj kultura agado de la Centra Laborrondo Esperanto en GDR, pri ties eldona laboro, kiu estas vere imitinda por aliaj landoj Sovetaj esperantistoj konsideras la numerojn de „PACO“, eldonatajn en GDR, perloj de la porpaca eldona laboro. Kun granda intereso ni legas ankaŭ la gazeton „Der Esperantist“, kiu enhavas tre interesan kaj ĉiuflanke utilan materialon. Oni povas nur domaĝi, ke tiu valora gazeto ne estas vaste abonebla. La scivolema ĉeestintaro faris al kamaradoj Aleksiev kaj Graetz multajn demandojn, al kiuj la parolintoj detale respondis.

La vesperon partoprenis ankaŭ aliaj samideanoj el Bulgario kaj Hungario kaj pro tio la renkontiĝo iĝis vere internacia kaj fruktodona.

Ni dankas al niaj gastoj-amikoj kaj deziras al ili plurajn senĉesajn sukcesojn en ilia senlaca peresperanta porpaca kaj porsocia agado.

V. Samodaj (Moskvo)

---

*

Al ĉiuj gelegantoj ni deziras tre feliĉan kaj fruktodonan 1972! Ĝi estu sukcesa kaj plue pliprofundigu nian amikan kunlaboron. Al la vjetnama kaj ĉiuj aliaj batalantaj por la libero popoloj la nova jaro alportu finfine la pacon!

La redakcio

*

LA JUNA ESPERANTISTO



Tutrespublika Esperanto-Junulara seminario

La 16-an kaj 17-an de oktobro en ĉeberlina urbeto Strausberg renkontiĝis pli ol 20 de la gvidoj junularaj reprezentantoj el ĉiuj distriktoj de la respubliko. Estis du tre interesaj kaj espereble fruktodonaj tagoj. La seminaron gvidis la membro de CLR kaj vicprezidanto de TEJO dro Hans Eichhorn, kiu raportis amplekse pri la 27-a Junulara Esperanto-Kongreso en Edinbourgh kaj pri la strukturo, celoj kaj agado de TEJO. Sekvis treege interesa kaj freŝsprite prezentita prelego pri la internacia junulara laboro (neesperantista) de GDR far Frank Bochow, sekretario por internaciaj rilatoj de Libera Germana Junularo (FDJ). Frank Bochow, kiu ankaŭ partoprenis la grandajn internaciajn kontraŭimperiismajn mitingojn de la demokrata junularo en New York 1970 kaj ĉijare en Santiago de Chile, donis ege valorajn informojn pri la strategio kaj taktiko de la progresiva internacia junulara laboro.

Detlev Blanke, sekretario de CLR, resumis la bazajn principojn de la rilatoj de CLR al internaciaj esperanto-organizoj. Plue oni diskutis pri eventuala internacia tendaro julie 1972 ĉe Karl-Marx-Stadt (Rabenstein), partopreno en eventuale en Berlin okazonta monda festivalo de junularo kaj aliaj planoj.

La semajnfino, diskutriĉa kaj junuleska, taksiĝas kiel grava paŝo antaŭen. Ĝin sekvu eĥo en distriktoj kaj subdistriktoj!

Austausch von Jugendgruppen

Angeregt von dem Gedanken zur Pflege der internationalen Freundschaft begannen in Warin (Bezirk Schwerin) vor ungefähr zwei Jahren Schüler der 8. und 9. Klasse, Esperanto zu erlernen. Diese Bemühungen führten dazu, daß in diesen Sommerferien eine Gruppe von 10 Esperantisten mit Unterstützung des Deutschen Kulturbundes eine Reise in die Volksrepublik Polen durchführen konnten.

Eine Jugendgruppe der Bezirksstadt Bydgoszcz, zu der schon vorher einige briefliche Verbindungen bestanden, war bereit, unsere Touristengruppe aufzunehmen, um anschließend in einem Gegenbesuch bei uns Land und Leute kennenzulernen.

Für unsere Jugendfreunde wurde diese Fahrt ein recht erregendes Erlebnis; war es doch die erste Reise in das sozialistische Ausland. Die Teilnehmer erlebten die große Gastfreundschaft der polnischen Familien. Unsere polnischen Freunde gaben uns die Möglichkeit, eine Fahrradfabrik, ein Rechenzentrum der Post, eine Bibliothek mit vielen historischen Werken über die Entwicklung Polens sowie andere Sehenswürdigkeiten dieser schönen Stadt an der Brda kennenzulernen.

Gemeinsam konnten wir feststellen: richtig war und bleibt der regelmäßige gegenseitige Besuch von Jugendgruppen. Daher ist eine gute politische und organisatorische sowie sprachliche Vorbereitung unbedingt erforderlich.

Die zweckmäßige Zusammenarbeit mit anderen Arbeitsgemeinschaften des Deutschen Kulturbundes wie z. B. mit der Arbeitsgemeinschaft Photographie kam darin zum Ausdruck, daß diese eine kleine Dia-Serie über die Stadt Warin zur Verfügung gestellt hat.

Der Besuch und der Austausch dieser beiden Jugendgruppen fand auch in der Bydgoszczer Tageszeitung „Ilustrowany Kurier Polski“ eine entsprechende Beachtung. In dem Artikel über diesen Besuch heißt es zum Schluß: „Die Esperantisten der beiden Länder haben die persönlichen Kontakte sehr begrüßt. Im kommenden Jahr werden weitere Gespräche der Esperantisten auf freundschaftlicher Ebene der beiden Bezirke weitergeführt. Solche Kontakte muß man pflegen.”

Wir sind der gleichen Ansicht und werden alles daran setzen, unsere gut nachbarlichen Beziehungen mit Hilfe des Esperanto weiter zu festigen und zu entwickeln.

Schlußfolgernd ergeben sich für uns bei künftigen derartigen Besuchen nachstehende Aufgaben:

a) Voraussetzung für derartige Treffen muß sein, daß jeder Teilnehmer ein bestimmtes Minimum an Sprachkenntnissen besitzt.

b) Eine vorhergehende individuelle Briefkorrespondenz ist erforderlich, um bestimmte gemeinsame Interessen kennenzulernen.

c) Außer der materiellen Sicherung wie Unterkunft, Verpflegung und Betreuung muß ein vielseitiges und politisch gut durchdachtes Programm organisiert sein.

Hans Diedrich, Schwerin

„Liberaldemokratische Zeitung“, Halle, 7. 5. 71, pri fervojista esperanto-kongreso en Maribor; 7. 9. 71 pri rilatoj Taschkent—Halle pere de Esperanto;
„Thüringische Landeszeitung“, Gotha, 18. 5. 71, pri loka renkontiĝo, 31. 7. 71 pri subdistrikta renkontiĝo; 17. 9. 71 „ponto super la kontinentoj“, artikolo informriĉa; 15. 9. 71 pri esperanto-atlaso el Praha;
„Gummiwerker“ Tabarz, 26. 5. 71, pri loka renkontiĝo; 28. 4. 71, distrikta renkontiĝo; 8. 9. 71 ampleksa artikolo pri fondo de grupo kaj agado; 21. 9. 71 pri novaj kursoj amplekse;
„Freie Erde“, Neubrandenburg, 30. 4. 71, pri grupo en Templin 3. 7. 71 kursfina festo en Anklam;
„Bauernecho“, Berlin, 27. 4. 71, pri „Klereco por hodiaŭ kaj morgaŭ“;
„Das Volk“, Erfurt/Gotha, 17. 4. 71, pri fondo de Esperanto-rondo; 16. 9. 71 ampleksa respondo de lingvisto prof. Spitzbardt je demando de leganto pri Esperanto, la respondo estis tre subjektiva kaj ne atentanta la faktojn. CLR reagis kun bona rezulto; 15. 9. 71 anonco de prelego; 29. 9. 71 kaj 16. 10. 71 pri novaj kursoj;
„Brandenburgische Neueste Nachrichten“, Potsdam, 18. 6. 71, pri traduko de popularscienca verko de Bruno H. Bürgel en E-o;
„Der neue Weg“, Halle u. Magdeburg, 3. 6. 71, ampleksa artikolo „Kontaktoj kun multaj popoloj“;
„Sächsisches Tageblatt“, Dresden, 23. 6. 71, ampleksa pri E-o; 2. 6. 71 ampleksa ĝenerala informado;
„Neuer Weg“, Frankfurt/O., 24. 6. 71, anonco pri kurso;
„Magdeburger Zeitung am Wochenende“ (Volksstimme), 24. 6. 71, grasslitere pri klubvespero dediĉita al laboristmovadaj tradicioj;

Metodikaj spertoj

Kiamaniere mi instruas Esperanton

Esperanto estas de mi instruata en la Teksa teknikumo en Vraca, Bulgarujo. Mi instruas laŭ diversaj metodoj kiel:

1. *Per objektoj* — Ĉe-metodo, parolante preskaŭ nur esperantlingve.
2. *Per magnetofono* — mi hejme surbendigas tekston. En la lernejo sur la nigra tabulo mi skribas la saman tekston kaj la lernantoj kelkfoje ripetas ĝin kune kun la magnetofono (ĉiuj).
3. *Per bildoj* — grandaj, rakontante, kio estas sur la bildo, mi klarigas la nekonatajn vortojn. Per ili ni konversacias.
4. *Per vortŝanĝo* — t. e. sur kartonaj folioj estas skribitaj apartaj vortoj de iu frazo. Mi metas senorde la vortojn sur speciala surmetaĵo (tablo) kaj lernanto ordigas ilin en bona frazo. Tion ĉi mi praktikas je la fino de la leciono.
5. *Per diktado de iu leciono* — en la fino ili mem kontrolas la ĝustecon de la teksto.
6. *Legado de lernolibro, gazetoj, revuoj, kaj specialaj preparitaj de mi grandaj kartonpaperoj kun teksto* — iu legas, alia tuj tradukas.
7. *Per diapozitivoj pri fabelo,* kiujn mi mem preparas en nia lerneja fotolaboratorio. Teksto sub la bildoj estas en bulgara kaj Esperanta lingvoj.
8. *Per kino-filmoj* kun surbendigita teksto en Esperanto.

E. Daskalov (El Heraldo)

„*Der Morgen*“, Berlin, 8. 8. 71, la kontribuoj de Peter Levsen „Pri la praktika utilo de E-o“; 5. 9. 71 „Du signifoplenaj mondkongresoj“; 19. 9. premia konkurso; 19. 9. 71 solvo de la konkurso; „Ĉu vi volonte lernas poemojn?“; 17. 10. 71 „La boto estis venenita“ (anekdoto metode prilaborita); 31. 10. 71 „Flago el Vjetnamio“ (pri Espo en Vjetnamio);

La konribuoj de P. Levsen alportas al ĉiu kursgvidanto valoran materialon, aperadas ĉiun duan dimanĉon. Nepre havigu al vi!

„*Der Morgen*“, Frankfurt/O., 21. 7. 71, 130 linia (!) artikolego pri praktika uzo de E-o, tre sprita; 26. 8. 71 anonco pri kurso;
„*Neuer Tag*“, Frankfurt/O., 6. 8. 71, „Ĉu vi konas e-on?“;

Pri la UK en London i. a. raportis:

„*Neues Deutschland*“, Berlin/DDR, 5. 8. 71, (apelo el London, antaŭlasta paĝo sube);
„*Mitteldeutsche Neueste Nachrichten*“, Halle, 3. 8. 71; „*Freie Presse*“, Karl-Marx-Stadt, 5. 8. 71; „*Bauernecho*“, Berlin, 10. 8. 71; „*Tribüne*“, Berlin, 4. 8. 71; „*Ostseezeitung*“, Rostock, 3. 8. 71; „*Sächsisches Tageblatt*“, Dresden, 4. 8. 71; „*Mitteldeutsche Neueste Nachrichten*“, Leipzig, 3. 8. 71; „*Das Volk*“, Gotha, 2. 8. 71; „*Thüringische Landeszeitung*“, 2. 8. 71;

Pri la TEJO-Kongreso en Edinbourgh raportis i. a.:

„*Neues Deutschland*“, Berlin/GDR, 19. 8. 71, ampleksa artikolo kun grasega surskribo pri aliĝo de GDR al TEJO; „*Volksstimme*“, Magdeburg, 19. 8. 71; „*Märkische Volksstimme*“, Potsdam, 19. 8. 71; „*Thüringische Landeszeitung*“, Weimar, 19. 8. 71; „*Bauernecho*“, Berlin, 20. 8. 71;
„*Nowa dobo*“, en sorba lingvo, Bautzen, 23. 8. 71.

Pri aliaj temoj: „*Tribüne*“, Berlin, 30. 8. 71, atlaso el Praha;
„*Sächsische Zeitung*“, Niesky, 11. 8. 71, pri germana-pola amikeco;
„*Märkische Volksstimme*“, Potsdam, 4. 8. 71, pri „klereco . . .“;
„*Ostseezeitung*“, Rostock, 6. 8. 71, pri kurso;
„*Werftstimme*“, Warnemünde, 9. 9. 71, ampleksa artikolo pri nova kurso;
„*Schweriner Volkszeitung*“, 22. 9. 71, ampleksa artikolo pri intelektaj valoroj de Esperanto;
„*Der Morgen*“, Frankfurt/O., 2. 9. 71, amplekse pri „inventita lingvo“;
„*Frankfurter-Tele-Expreß*“, 21. 9. 71, amplekse pri nova kurso;
„*Ostseezeitung*“, Rostock, 8. 9. 71, pri nova kurso;
„*Lausitzer Rundschau*“, Bautzen, 17. 9. 71, amplekse pri Esperanto;
„*Werftstimme*“, Warnemünde, 2. 9. 71, amplekse pri nova kurso, 16. 9. 71, 23. 9. 71; 30. 9. 71, 7. 10. 71, ampleksega kaj tre lerte verkita vojaĝraporto pri Bulgario de Paul Köster;
„*Sächsisches Tageblatt*“, Dresden, 8. 9. 71, tre ampleksa artikolo pri E-o kaj anonco de prelego de D. Blanke ĉe „Urania“;
„*Freie Presse*“, Karl-Marx-Stadt, 15. 10. 71, anonco de kurso;
„*Norddeutsche Neueste Nachrichten*“, Rostock, 9. 10. 71, pri nova kurso;
„*Neue Zeit*“, Berlin, 3. 10. 71, fondo kaj planita agado de nova grupo en Frankfurt/Oder;
„*Der Morgen*“, Berlin, intervjuo kun la gajninto de la 1-a premio de la e-o-konkurso en „Der Morgen“ 13. 10. 71;
„*Ostseezeitung*“, Rostock, 12. 10. 71, „internacie elprovita“ ampleksa pri E-o kaj nova kurso;
„*Werkstätten-Express*“, Delitzsch, oktobro 1971, pri la bonega kultura laboro de la e-o-grupo en RAW;

„Horizont“ n-ro 44, longa artikolo de Rudi Graetz sub la rubriko „Antwort auf Leserfragen“

Ĉu ne ankaŭ vi povus starigi „demandojn?“

Parolas Kalocsay

La 6-an de septembro la koloso de la esperanto-literaturo, la erudicia gramatikisto, Kalman Kalocsay, profesoro de medicino, fariĝis 80-jara. Oni ne povas ne admiri la faritajn gigantajn laborojn de tiu eminenta homo. La redakcio de „der esperantist" Centra Laborrondo Esperanto de GDR kaj la esperantistoj de GDR tre kore gratulas al la jubileulo, kvankam iom malfruiĝinte, kaj deziras ankoraŭ multajn jarojn da sano kaj kreiva laboro.

Pli bone ol longaj priparoloj la viglecon kaj nemalfortiĝantan kreivecon de Kalman Kalocsay prilumas la jena intervjuo, kiun faris Giorgio Silfer el Milano kaj kiun ni represas kun afabla permeso de „Literatura Foiro".

G. S.: Post via lasta verko, kiaj estas viaj nuntempaj projektoj,

Mia lasta verko estas la traduko de „La Tempesto", de Shakespeare, jam aperinta. Nun kompreneble projektojn mi havas tre multajn, verŝajne tial ĉar mi povas jam fari senrespondece ĉion, kion mi volas, ĉar mi ne havas tempon. Mi volus fari esearon (laŭ la kanvaso de „Lingvo Stilo Formo"), poste mi volus fari kriminalan romanon, sed ne tro longan, kie la murdisto estas tre malfacile kaptebla (sed tion bonvolu ne skribi) kaj tamen fine malkaŝiĝas, ke estis gramatika afero. Mallongan futurologian romanon mi volus verki, sed laŭ diferenca tendenco: min ĉagrenas, ke en futurologiaj romanoj temas precipe pri teknika evoluado, sed mi volas optimisman kaj harmonian vivon, sendepende de ĉia tekniko — ne forĵeti teknikon, sed bridi ĝin. Laŭ mia opinio la teknikaj progresoj ne devas esti fetiĉo; ni faris ekzemple fetiĉon tian el la aŭtomobilo, ke pro ĝi ni eĉ ne povas plu komuniki.

G. S.: Ĉu neniam embarasis vin la rango de Morala Majstro de la Movado, kiun plurparte oni agnoskas al vi?

Morala majstro? Mi ne scias. Tio ne embarasas min, ĉar neniu diras tion vidalvide. Kelkfoje oni eĉ atakas min, kaj tio estas por mi agrabla: mi neniam volas senti min Buddo de Esperanto. Buddo, kun du „d", kiel diras la P. I. V.

G. S.: La „Dia Komedio" estas unu el la malmultaj verkoj tradukitaj laŭ altnivela stilo plurfoje. Ĉu vi volas kompari la tradukon de Peterlongo kun la via?

Estas tre malfacile ion diri, ĉar tia traduko estas afero de pietato, tamen li faris ĝin inter tre malfacilaj cirkonstancoj, en koncentrejo, aŭ pli bone malliberejo, dum la unua mondmilito, en tempo, kiam ankoraŭ ne ekzistis ellaboreco de la lingvo, per primitiva lingva materialo — ŝajnas, ke li eĉ ne legis la tradukon de Grabowski „Sinjoro Tadeo"; oni devas diri, ke li faris admirindan laboron.

G. S.: Kion vi opinias pri la kunlaboro inter Esperantaj literatoroj?

Ĝis nun tia kunlaboro ne estis organizita, sed ne mankis tute: mi estis en vigla koresponda interrilato kun Boulton, kun Reto Rossetti, sen paroli pri Waringhien, kaj mi eĉ kunlaboris, ĉar Rossetti revizias miajn tradukojn el Shakespeare, kaj mi reviziis lian „Koriolano", kiu poste ne aperis, mi ne bone scias kial. En la kadro de la Akademio ekzistis Literatura Fako, kies estro estis Auld, kiu poste abdikis, demisiis, ne plu interesiĝis.

Tia organizo havus sencon, se oni havus eldonejon aŭ eldonejojn .

Ke ĉirkaŭ la literaturo ne ĉio estas en ordo. tion konsciis eĉ UEA, kiu ĝuste starigis tiun komisionon estratan de Emilija Lapenna; ŝi sendis cirkuleron al multaj, interalie ankaŭ al mi kaj mi respondis, sed ŝajnas, ke ili puŝiĝis al tiaj obstakloj, kiujn oni ne povis venki. En „Hungara Vivo" ia raporto aperos pri la farita laboro; praktike, unue ni devas fari legantojn kaj krome ĉiuj diris, ke la „verda tempo" jam pasis, ke la tiama entuziasmo eksmodiĝis.

Oni laboris por Esperanto entuziasme, kaj ĝuste tial agis la tiamaj literatoroj, ne por gajni.

Rigardu, ankaŭ tio estas interesa, ke oni konstatas la ekziston de la poemo kaj de la novelo en Esperanto, kaj same la neekziston de la dramo kaj de la romano. Tio ĉar poemo estas facile verkebla, vi eĉ povas ĝin elpensi sur la tramo, kaj iri hejmen kaj tajpi ĝin. Same okazas por la novelo, sed por la romano ne, kaj eĉ por la dramo, ĉar tiaj ĝenroj postulas tempon, kulturan preparon, do financan sekurecon de la verkisto.

G. S.: Kiel vi taksas la staton de la nuntempa Esperanto-literaturo?

Vi faras facilajn demandojn, kiuj tamen postulas malfacilajn respondojn. Rigardu, ĉiam povas veni surprizoj, aŭ tiel ke tute nekonata genio montriĝas, aŭ tiel ke konata Esperantisto malkovras genion.

Mi ne scias, ĉu la denaskaj Esperantistoj fariĝis grandaj literaturoj. Esperanto estas tamen la dua lingvo, oni devas ja maturiĝi en Esperanto por du, tri jaroj, kaj cetere. Krome notu, ke la vere talentajn altiras ilia gepatra lingvo. Nu, estas la granda demando, elekti inter la sia aŭ Esperanto: granda tento por persono, kiu sentas talenton. Ĉu verki Esperantlingve por eldoni 1 000 kopiojn aŭ verki en nacia idiomo por eldoni 50 000? Pro tio mi mem hontas kelkfoje, vidante la kvantojn de la Esperantoeldonoj. Oni devas organizi la Esperantan literaturon: ekzemple la librovendado tute ne estas regulita; kaj kien ĝi sin turnu.

Estas tiu diabla cirklo rompenda, ke la legantoj estas malmultaj, do la prezoj estas altaj, sed tio ja malmultigas la legantojn, kaj tiel plu.

Vi povus nur per tia „se" respondi: SE estus valida librovendado, tial ankaŭ la talentuloj ne estus elsuĉitaj de la gepatra lingvo.

La enigmegon ellaboris Jürgen Hamann

B) interna parto (kun finaĵoj) h o r i z o n t a l e : 1. malantaŭ; 4. internacia E-organizaĵo laboranta kontraŭ militarismo kaj por paco; 6. malsaneca ruĝa ŝvelaĵeto sur la haŭto; 9. mallongigo por komitato, kiu preparas la UK; 11. renkonto hazarda aŭ celanta; 13. ludkarta koloro; 15. grupo, amaso; 16. enfosita eksplodkesto; 19. tria potenco de nombro; 20. unuo de elektra rezistanco; 21. skandinava monero; v e r t i k a l e : 1. mallongigo por E-organizaĵo en nia najbara lando; 2. prepozicio; 3. kurmaniero inter paŝado kaj galopo; 4. malŝata ŝerco; 5. naza elfluaĵo; 8. duoble du; 10. produto de 8. plus unu; 12. speciala formo de paralelogramo; 13. manĝaĵo (ekz. el grio aŭ faruno); 14. ŝtonego; 17. mallongigo por E- organizaĵo celanta la oficialigon de E; 18. manĝebla kokina produktaĵo.

GRANDA JUBILEA ENIGMO



A) ekstera parto (sen finaĵoj!) d e m a l d e k s t r e d e k s t r e n : 1. seĝo sur la dorso de ĉevalo; 2. esprimo de respekto; 3. botelo kun larĝa aperturo; 4. parto de ĉemizo; 5. dekduono de jaro; 6. senarba, herbriĉa, granda ebenaĵo; 7. somerdomo; 8. globforma peco (de manĝaĵo aŭ neĝo); 11. cifero; 12. monaĥeja estro; 13. ekstera ŝtuparo; 14. mallonga beletra rakonto; 15. militistaro por defendi la nacian teritorion; 16. administracio por publika ordo; 17. sento de doloro; 18. artaviada figuro; 21. trueto en la haŭto; 22. afrika remaĉulo kun longa kolo; 24. enigmo bazanta sur desegnoj; 26. koresponda skribaĵo; 28. migdalmielaĵo; 30. natura akva fluaĵo; 32. floro (simbolo de pureco); 34. filo de filo aŭ filino; 36. korpoparto; 38. nigra, tre malmola ligno; 39. konfirmi internacian kontrakton; 41. maldika etendaĵo sur io alia; 43. injektaĵo; 45. grimpanta vegetaĵo (biera spico); 47. optika fenomeno precipe en sudaj landoj; 49. malantaŭa parto de kolo; d e d e k s t r e m a l d e k s t r e n : 3. vira voĉo; 4. digo antaŭ la haveneniro; 5. malpuraĵo; 6. muzikverko; 7. spicaĵo por kuko aŭ pudingo; 8. kampado; 9. duonnegro; 10. hararo de ŝafo; 13. Manĝaĵo el bakita faruno; 14. densa akva vaporo; 15. parto de la filozofio, kiu pritraktas la homan konduton; 16. ekstrema parto de akso, kiu turniĝas en truo; 17. grava ceremonio; 18. balancebla infanlito; 19. okupo, profesio; 20. ero, elemento de io; 21. dolĉa frukto; 23. organo de aŭdkapablo; 25. hebrea pastro; 27. estonteco; 29. tranĉa ilo; 31. profunda, kruta valeto; 33. porcelana manĝujo; 35. brusta osto; 36. ludkarta koloro; 37. tago de semajno; 40. kalia hidroksido; 42. grado de scio, kapablo, lingvouzo; 44. loko, kie oni pritraktas publikajn aferojn; 46. furaĝa vegetaĵo; 48. marfiŝo; 50. speco de farbo.

Eksterlandaj vizitantoj en Großenhain

La malgranda Esperantogrupo de Großenhain en tiu ĉi aŭtuno havis sian kvaran eksterlandan vizitanton. La grupo estis vizitata de pola leteramiko, kiu korespondas du jarojn kun geamikoj al nia urbo. Poste vizitis nin nederlanda samideano. El Japanio alvenis Esperanto-amiko, kiu partoprenis la UEA-Kongreson en Helsinki. Kun tiuj esperanto-amikoj ni havis interesajn vesperojn, je kiuj ni parolis pri la rolo de GDR en la mondpaca movado pri kulturo kaj arto.

La japana amiko raportis pri la UEA-Kongreso en Helsinki kaj pri la batalo en Japanio kontraŭ Satoreĝimo kaj por pli bona vivo de laboristoj en Japanio.

Intervjuo en „Deutschlandsender"

La 28-an de aŭgusto 1971 d-ro Hans Eichhorn donis intervjuon al la tutrespublika radiostacio „Deutschlandsender" pri la 27-a TEJO-kongreso en Edinbourgh kaj la aliĝo de GDR al TEJO. Ĝi estis dissendita 16,50 horo.

Leipzig: La 8-an de septembro okazis en Leipzig la ĉijara aŭtuna foira vespero. Partoprenis ĉirkaŭ 70 personoj el Leipzig, Berlin, Schwerin, Halle, Dresden. El eksterlando oni povis saluti gastojn Bulgario kaj Pollando. La prezidanto de CLR raportis pri la 56-a UK en Londono.

Magdeburg: La 14-an de oktobro gastis en la domo de la Kulturligo kvarkapa grupo de la Praga Konservatorio per koncerto kun verkoj de Smetana, Dvorak kaj aliaj ĉeĥaj komponistoj. La estro de la grupo, la violonĉelisto d-ro Pradoslav Sadlo, tre surprizis nin, venante horon antaŭ la koncerto en nian ĉambron, kie okazis nia Esperanto-kurso, kaj prezentante sin en flua Esperanto. Tutan horon d-ro Sadlo rakontis interesajn travivaĵojn el sia Esperanto — vivo kaj pri la nuna situacio de Esperanto en Ĉeĥoslovakio. Poste preskaŭ ĉiuj el nia grupo partoprenis la koncerton. Tiu ĉi unua persona kontakto kun eksterlanda esperantisto estis tre interesa por la gekursanoj, kaj ni ĉi tie ankoraŭfoje tre kore dankas d-ron Sadlo por la vizito de nia grupo.

Dungert

Leipzig: Okaze de la 13-aj Laboristaj Festludoj la Karl-Marx-Universitato en Leipzig organizis „Hobio-ekspozicion", al kiu ankaŭ kontribuis Erich Löwe. Por sia malgranda sed bone elektita kontribuo pri Esperanto en la servo de la medicino li ricevis eĉ monpremion.

Bezirk Neubrandenburg: Zu Ehren der Volkswahlen haben die Esperantisten in *Anklam* gemeinsam mit anderen DKB-Arbeitsgemeinschaften eine Ausstellung durchgeführt, die reges Interesse hervorrief.
Bdfrd. Hans Moser erhielt die offizielle Genehmigung, an der „Ernst-Schneller-Schule" in *Prenzlau* die Arbeitsgemeinschaft Esperanto zu leiten.

Ni kondolencas

Mortis la 6-an de Oktobro la brita MEM-Peranto kaj pacamiko

Charles Fielding.

Mortis la 19-an de aprilo 1971 k-do

Kurt Lucha,

aktiva membro de la grupo el Magdeburg.

„Dresdenanoj koncertis en Melnik“

Longjaraj amikaj rilatoj ligas la Dresdenajn geesperantistojn kun la Esperantogrupo en Melnik. Ĉar juneco tie abundas en la movado, jam dum la I-a renkontiĝo 1967 partoprenis 10 junaj geamikoj el nia urbo. En printempo la grupo el Melnik, sub la gvido de S-ro J. Vitek vizitis nian faman pentraĵgalerion kaj aliajn vidindaĵojn. Okaze de la ĉiujara aŭtuna renkontiĝo en ilia urbo oni denove nin kore invitis.

Kelkaj el la Dresdenaj esperantistoj ankaŭ laboras sur kultura kampo, nome ili estas regulaj membroj de popolmuzik-orkestro de fabriko por mezuriloj. Tiel ekestis la intereso ambaŭflanka, starigi novajn kulturpolitikajn rilatojn inter ĉeĥaj kaj germanaj Esperantogrupoj. Por tiu celo la Esperantogrupo en Melnik, kunlabore kun la tiea kulturdomo, invitis nian orkestron doni koncerton dum la V-a renkontiĝo de Esperantistoj en Melnik.

La orkestro, 12 persona sub artgvido de s-ano Rolf Deke konsentis, aranĝi publikan duhoran festkoncerton honore al la amika renkontiĝo. La programo enhavis i. a. melodiojn de ĉeĥaj-, germanaj- kaj sovetaj komponistoj. Omaĝe la 22-jaran datrevenon de GDR ni prezentis tie nian programon kompreneble sen financaj postuloj kaj ĉiu membro de la orkestro financis mem la vojaĝon kaj la transporton de instrumentaro.

La koncerto mem okazis la 17-an de oktobro 1971 en la granda salonego de la kulturdomo. Proksimume 400 gastoj el pluraj regionoj de ĈSR, Hungario kaj GDR vizitis la publikan koncerton. Ke la V-a renkontiĝo kaj la koncerto tiel bonkvalite pasis, tion ni dankas precipe al la energia helpo de S-ro J. Vitek, kiu ankaŭ dulingve gvidis faksperte tra nia programo.

Nia orkestro ĝis nun ne havis tian entuziasman aŭskultantaron, tiel eĉ la programo plilongiĝis duonan horon.

Ni estas fieraj, ke per tio ni povis aldoni decidan parton al tiu ĉi grava kultura okazintaĵo, kiun oni prijuĝis valorega al la intensigo de amikeco inter ambaŭ socialismaj ŝtatoj.

Dum la verspero la eksterlandaj gastoj kunvenis kun lokaj reprezentantoj kaj de ĉeĥa asocio. Honore al la gastigantoj, ni transdonis bildlibrojn pri GDR kaj Dresdena Galerio. Interparoladoj kaj popolkantoj ĉeĥaj kaj germanaj vigligis la popolamikecan atmosferon.

Tia okulfrapa amika interrilato montris ankaŭ al niaj neesperantistaj membroj de la orkestro la plej bonan efikon de nia lingva laboro kaj donis per tio taŭgan propagandan instigon.

Rolf Deke, Dresden

„Esperanto servas al ĝemelaj urboj“ Korespondo de amikoj

Ankoraŭ ne tutan jaron funkcias en Velikie Luki, Soveta Unio, rondeto de esperantistoj. Anoj de la rondeto iniciatis korespondon kun esperantistoj de la urbo Gera. La germanaj amikoj en leteroj rakontis pri sia urbo, ĝia historio kaj nuntempa evoluo. Siaflanke velikolukanoj konatigis la loĝantaron de tiu urbo en GDR kun rimarkindaĵoj de nia regiono. (el Pskovskaja Pravda, 19. 9. 71) K-do S. Ismajlov prenis laŭdindan iniciaton: En la gazeto „Velikelukskaja Pravda“ de 9. 9. 71 li publikigis sufiĉe longan artikolon pri la urbo Gera. La faktojn por la artikolo li ricevis el la korespondo kun la esperantisto el Gera Rudolf Hermann.

Vere tre imitinda modela laboro!

Ni estis tie!

Kie? Temas pri Lanĉov. Ĝi situas en la najbara Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, pli precize en suda Moravujo. Sed ne prenu dikan atlason kaj ne serĉu tiun ĉi lokon, certe vi ne trovos ĝin. Temas pri malgranda vilaĝo, en kies proksimeco okazas ĉiujare Somera Esperanto Tendaro (SET). Ĉisomere jam la 19-a. Ĝi havas ĉiujare du etapojn po du semajnoj en julio/aŭgusto. Al la dua etapo, kiun ni partoprenis, aliĝis 126 personoj, precipe gejunuloj, kiuj lernis Esperanton en diversgradaj kursoj. Krom ili estis en la tendaro kompreneble ankaŭ geinstruistoj, kuiristinoj kaj tendargvidantoj. Entute 144 personoj, inter ili bedaŭrinde nur 7 eksterlandanoj.

Ĉiu partopreninto devis viziti kurson kaj diligente lerni por sukcese fari ekzamenojn pri siaj konoj de Esperanto je la fino de la restado. La instruado okazis antaŭtagmeze. Posttagmeze oni povis naĝi en la proksima valbaraĵo aŭ alimaniere agrable trapasi la tempon. Vespere estis ĉiutage interesa programo. Oni projekciis Esperanto-filmojn, montris diapozitivojn kaj organizis diverstemajn prelegojn. Neforgeseblajn horojn ni travivis ankaŭ ĉe la vesperaj tendarfajroj. Krom tio la programo enhavis tuttagajn ekskursojn. Dimanĉe kompreneble ne estis instruado, kaj tial ni amuziĝis elektante „Miss Lanĉov". Posttagmeze okazis granda tendara karnavalo.

Pri ĉiuj interesaĵoj kaj sciindaĵo el la tendara vivo informis nin SET-bulteno, kiu aperis en la tendaro. La vetero estis belega, la manĝaĵoj bongustaj, la ĉeestintoj amikaj kaj simpatiaj, la organizo bonega, la instruado altnivela kaj la gelernantoj diligentaj.

Preskaŭ ni forgesis rakonti, ke okazis ankaŭ granda „meĥeĥeo". Sed kio tio estas, tion ni ne malkaŝos al vi. Se vi volas ekscii tion. partoprenu venontjare la jubilean 20-an SET-on en Lanĉov. Vi certe ne bedaŭros tion.

D. Berndt

Rathenow: La unua septembra kunveno de nia grupo koincidis kun la ŝtata festotago de la Vjetnama Demokratia Respubliko. Ĉar la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio en la nuna jaro festas sian 15-an jubileon nin instigis tiu fakto, aranĝi Vjetnam-vesperon.

Ni ekspozis ĉiujn literaturajn verkojn, ĵurnalojn, informilojn kaj informadojn el Vjetnamio, kiujn ni posedas, kaj pridiskutis ilin. La multnombro kaj multspeco de tiuj eldonaĵoj denove impresis nin. Precipe ni admiras la kontinuan kaj akuratan eldonadon de la publicaĵoj, speciale de l' „Paco", kiun ebligas la Vjetnamaj amikoj sub ekstreme malfacilaj cirkonstancoj.

Por pluraj aliaj MEM-sekcioj, laborantaj sub multe pli facilaj kondiĉoj, tiu aktiveco estu imitinda ekzemplo.

La vesperon ni finis per forsendo de salutadreso al VPEA, esprimante nian admiron por tia senlaca laboro, certigante nian daŭran solidarecon kun la heroa kaj brava Vjetnama popolo kaj nian neskueblan konvinkon pri ĝia finfina venko.

R. Rabenalt (grasigo de la red.)

Redakcia noto:

La lastaj 2—3 serioj de Curt Kessler aperos en n-ro 51/52. En n-ro 51 aperos lasta parto de la komplementa vortaro.



Filatela Klubo „Esperanto"

15-an de septembro 1970 fondiĝis tiu klubo kiel sekcio de Pola Filatela Asocio. La unua tutpollanda kunveno por la membraro okazis la 13-an de junio 1971. Partoprenis ĉirkaŭ 80 filatelistoj.

La filatela klubo „Esperanto" eldonas ĉiukvaronjare bultenon por informi la membraron pri E-filatelaj novaĵoj. Oni intencas aperigi E-filatelan kronologion, organizi ĉiujare ĝeneralan kunvenon por la tuta membraro, aperigi memorajn poŝtstampojn, okazigi prelegojn en filatelaj k esperantaj kluboj pri E en filatelio.

Nunmomente tiu klubo nombras jam 75 membrojn. Inter ili estas 30 esperantistoj, la aliaj estas ne-esperantistoj.

Adreso de la klubo: Pola Filatela Asocio, Klubo Esperanto,
Kraków, str. Wiślna nr. 8, skr. p. 756

Universala Filatela Klubo „AREK"

„AREK" signifas: Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj. Tiu internacia klubo fondiĝis antaŭ kelkaj jaroj. La ĉirkaŭ 50 membroj el multaj landoj okupiĝas ĉefe pri kolektado de E-filatelaĵoj. Sed apud filatelaĵojn oni kolektas ankaŭ glumarkojn E-insignojn kaj aliajn nefilatelajn objektojn. La AREK-klubo regule eldonas informilojn por la membraro pri novaj poŝtaj E-stampoj, E-pm, E-glumarkoj. En tiu informilo, kiu havas la nomon „FENIKSO", oni ankaŭ trovas fakajn artikolojn pri E-filatelaĵoj. La klubo plue jam eldonis katalogojn pri E-pm, pri E-poŝtstampoj, pri E-glm, en preparo estas katalogo pri E-tutaĵoj. (Poŝtoficialaj kov. k pk.) Tre utila al la membroj estas la „Stampo-Servo", kiu liveras al la membroj ĉiujn novajn stampojn. Informoj ĉe Rudolf Burmeister 9033 Karl-Marx-Stadt, Wilhelm-Wolf-Straße 1.

Balta Esperanto-Tendaro en SU

La 13-a Balta Esperanto-Tendaro okazis en Smiltene (Latvujo), de la 6-a ĝis la 15-a de aŭgusto, organizita de Riga Esperanto Klubo. Partoprenis ĝin pli ol 300 geesperantistoj, plejparte junaj, el tuta Sovetunio. En la programo estis tri lingvoperfektigaj kursoj. Somera Universitato, tradukista seminario kaj artaj vesperoj, en kiuj partoprenis la kantkoruso kaj solistoj de la Esperanto-rondo de Latva Blindula Asocio el Riga sub la gvido de poetino Ludmila Jevsejeva. Ankaŭ omskaj gastoj donis plaĉan artan prezentadon. La ŝtata pupteatro el Panavezys (Litovujo) prezentis en Esperanto la teatraĵon „Tri porkidoj". En la loka kulturdomo okazis internacia ekspozicio de infandesegnoj, kolektitaj per Esperanto el 12 landoj.

Plutaga tutsovetia konferenco

La 5-a konferenco de Sovetia Esperanta Junulara Movado (SEJM) okazis de la 19-a ĝis la 25-a de julio 1971 sur la insulo Hortica kaj daŭris ankoraŭ du tagojn sur ŝipo iranta al Kievo. La aranĝon partoprenis 70 aktivuloj el 30 junularaj kluboj. En ĉiu tago oni laboris minimume po sep horojn. La sekretario de SEJM anoncis la rezultojn de la konkurado inter la kluboj. La unuajn tri lokojn gajnis respektive la kluboj en Barnaul, Ufa kaj Riga. Estis elektita nova komitato de SEJM kaj ĝia prezidanto Boris Kolker.

La 4-a IREN — neforgesebla aranĝo!

De la 17-a ĝis la 27-a de julio 1971 okazis en Abaliget (ĉirkaŭ 20 km okcidente de Pécs/Hungario) la 4-a Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamikoj. Partoprenis geesperantistoj el Pollando, Aŭstrio, Sovetunio (Litovio), Japanio, Ĉeĥoslovakio, Kanado, Hungario kaj Germana Demokratia Respubliko. La organizado sub la gvidado de s-ino Pállas estis kvazaŭ perfekta: eĉ esperanton parolantan kelneron ni havis!

La programo estis tre varia: ekskursojn al la belega sudhungara ĉirkaŭaĵo, viziton de la antikva fortikaĵo Siklos (jes, la sama fortikaĵo, kie oni faris la televidfilmon „Kapitän Tenkes").

Vespere prezentis s-ro Finkenzeller (Aŭstrio) kaj s-ro Mazys (Pollando) memfaritajn 8-mm filmojn. En la duontaga orientiĝa konkurso atingis la teamo kun s-ino Leubner el Pirna kaj s-ro Hamann el Leipzig la bronzan medalon. La pécs-a Esperanto-grupo prezentis esperantlingvan pupteatraĵon; okazis „Hungara Vespero" kun la sindikata popoldancgrupo (poste komuna dancado), boatparado kun lampionoj, kantadoj ĉe la tendarfajro ktp.

Nun, mi intencas partopreni ankaŭ la 5-an, 6-an kaj centan IREN. Mi tre ĝojus, se ankaŭ aliaj amikoj el nia lando partoprenos. Certe al ili plaĉos tiu interesa kaj bone organizita aranĝo.

Jürgen Hamann, Leipzig

10-a jubilea sesio de Somera Esperanto-Universitato

En la jaro 1972, inter la **10-a ĝis** 16-a de julio en Gyula okazos la 10-a, la jubilea sesio de la renoma SEU. Antaŭtagmeze estas prelegoj pri interesaj hungaraj aŭ internaciaj temoj je popularscienca nivelo. Posttagmeze estas ripozoj sur strando, en banejo aŭ ekster la urbo. Detalajn informojn ĉe Somera Esperanto-Universitato, Gyula, 48-as u. 11. Hungario.

5-a naturamika renkontiĝo

La 5-a internacia renkontiĝo de esperantistoj-naturamikoj (IREN) okazos de 24-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto 1972 en Abaliget. Ĉiujare kreskas la nombro de la partoprenantoj de IREN. Kiu foje vizitis ĝin, neniam forgesos la agrablajn tagojn, pasigitajn en belega naturo, en vere internacia atmosfero. La partoprenantoj vivas komforte, ripozas promenas, ekskursas, partoprenas amuzajn programojn aŭ vizitas la proksime situantan belan urbon Pecs, plena da arthistoriaj dokumentoj. Partoprenu la semajnon kaj petu detalajn informojn ĉe HEA, 3-a Teritoria Komitato, Pecs 1, Poŝtfako 2.

Ĉeĥo-slovaka renkontiĝo

Fine de septembro pli ol 300 ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj kaj gastoj el 7 landoj kunvenis en la moravia urbeto Vsetín. Altnivelan entreprenon aranĝis la loka ER sub la gvido de s-ano A. Berka. Okazis kunvenoj de ambaŭ naciaj E-organizaĵoj, ĈEA kaj AE SSR, kunsidoj de fakaj asocioj (teknika, medicinista, fervojista, krome fonda kunveno de informa sekcio), recita kaj oratora konkursoj. Al la valora kultura programo kontribuis grandparte la urba virina kanthoro, Laŭreato de Ŝtatpremio, folklora grupo „Jasenka" k. a. La lastan tagon oni ekskursis tra Valaĥio, la ĉirkaŭa regiono. kiun priskribas ankaŭ la belaspekta broŝuro en E-o porokaze eldonita de ER Vsetín.

O. Knichal

Internacia renkontiĝo en Jablonec n. N., Ĉeĥoslovakio

De la 30-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1971 okazis en Jablonec n. Nisou Esperanto-renkontiĝo kun 160 gepartoprenantoj el 4 landoj: Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando kaj Germana Demokratia Respubliko. La gastigantoj surprizis per riĉenhava kaj interesa programo: la 30-an de julio antaŭkonatiĝa vespero, la 31-an la solena malfermo de la renkontiĝo en la urbodomo, kie la urbestro salutis la ĉeestantojn. Sekvis akcepto de la unuopaj eksterlandaj reprezentantoj ĉe la urbestro, kiu post afabla konversacio transdonis memorajĵdonacetojn. Posttagmeze la gesamideanoj vizitis la bijuterian ekspozicion en Jablonec, vere rigardindan aranĝon. Samtempe okazis gazetara konferenco de ĵurnalistoj de 3 ĉeĥaj gazetoj kaj de la ĉeĥoslovaka radio kun la reprezentantoj de la en-kaj eksterlandaj E-asocioj, dum kiu estis substrekita la valoro de la internacia lingvo precipe dum internaciaj ekspozicioj, foiroj ktp. kaj por la plifortigo de la internacia amikeco. Vespere okazis amuza vespero kun gaja babilado, dancado kaj prezentado de modaj novaĵoj kun bijuteriaj valoraĵoj.

Dimanĉe sekvis vizito de la foiro en Liberec, posttagmeze okazis komuna vizito de la botanika ĝardeno kaj de la monto Jeŝted. Lunde denove kolektiĝis ĉiuj partoprenantoj por komuna aŭtobusa ekskurso tra la tiel nomata Ĉeĥa paradizo, belega regiono de Norda Bohemio. Vespere sekvis kora adiaŭo de la ĉarma urbo Jablonec kaj de la afablaj gastigantoj kun la promeso, venontjare denove veni al la Esperanto-renkontiĝo.

J. Haupt

Unika filatela materialo havebla

Al la E-filatelistoj en GDR estas havebla tre valora helpilo: Plena Ilustrita Poŝtstampa Katalogo. Sur dekkvin paĝoj troviĝas fotoj de ĉiuj 410 ĝis nun uzitaj poŝtaj E-stampoj. Kontraŭe al la unua eldono la nuna estas de bona kvalito. La stampoj estas bone legeblaj. Havebla ĉe R. Burmeister, 9033 Karl-Marx-Stadt, W.-Wolf-Str. 1

KORESPONDDEZIROJ

Britio

Radioteknikisto, 48 jara, dez. korespondi kun GDR-ano pri vivmaniero, eduka sistemo, libertempaĵoj k. t. p. Donald G. Dickinson, Ivy House, **Ousby,** Pentrith, Cumberland

ČSSR

Bakisto, 45 jara, interesiĝanta pri lumbildoj, esperantaĵo, dez. koresp. kun amiko el Potsdam aŭ Berlin. Jaroslav Beĉka, **Riĉany,** II/219 (če Praha)
Filatelisto dez. korespondi. Bily Zdenek, Velka 17, **okr. Prerov**

GDR

Vigla Esperanto-grupo (membroj de 15—60 jaroj) serĉas korespondamikojn en ĉiuj landoj, ĉefe en regiono Zielona Gora (Pollando) kaj urbo Witebsk (Soveta Unio). Sendu bele afrankitajn vidaĵkartojn. Respondo samvalore garantiata! Skribu al: Esperanto-Grupo če Germana Kulturligo, **12 Frankfurt/Oder,** Dr.-Otto-Nuschke-Straße 34, GDR
Dez. interŝanĝi pensojn kaj bildojn pri sinoptika tabelaro pri mondhistorio. W. Giese, **1124 Berlin,** DDR, Rupprechtstraße 19. Represo petata
Interesiĝantoj pri internaciaj ŝakludoj pere de Esperanto sin turnu al Martin Krätzschmar, **8019 Dresden**, Wallotstr. 14

Hungario

Junulo, 17 jara, dez. korespondi kun samaĝaj esperantistoj, ŝatas sporton kaj kol. bk pri floroj. Duali Zoltan, **Gyöngyös,** Bajza Jozsef Közepiskolai Kollegium, Pf. 128
Tiuj, kiuj serioze interesiĝas pri la FAK-INSTRUADO de esperantologio kaj interlingvistiko en la universitato de Budapest, bonvolu skribi al la adreso: SCIENCA RONDO STUDENTA — Unîversitato ELTE, **Budapest V.,** Pesti B. 1—3., Hungario
GESTUDENTOJ-ESPERANTISTOJ, dezirantaj korespondi, kolekti kaj interŝanĝi materialon en la temoj ESPERANTOLOGIO, INTERLINGVISTIKO, ĜENERALA LINGVISTIKO skribu al la adreso: SCIENCA RONDO STUDENTA, Universitato ELTE, **Budapest V.,** Pesti B. u. 1—3., Hungario
D-ro I. SZERDAHELYI sciigas, ke lia antaŭa adreso (BP., VIII., Szigetvári u. 22.) **ne plu validas.** Li petas la sendaĵojn adresi al lia ofica adreso: Unversitato ELTE, Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikita Lingvistiko, **Budapest V.,** Pesti B. u. 1—3., Hungario

Pollando

Instruisto, 25 jara, dez. korespondi tutmonde kaj interŝanĝi bk kaj esperantaĵojn. Jerzy Postuszny, **Wroclaw 17,** p. kesto 1629
Komencantino, 49-jara, profesie instruistino, dez. koresp. pri div. temoj. Danuta Kamiriska, **Kudowa-Ldvoj,** Klub „Nefryt"
Instruisto, 27-jara, turisto, dez. koresp. precipe kun GDR-anoj pri eventualaj vizitoj. Janusz Motykiewicz. **Babimost,** Zwirki i Wigury 3/2 Woj. Ziel. Gora
Filatelisto dez. koresp. pri filatelo, en Esperanto, ruse, france, germane kaj angle. Jerzy Zyzniewski, **Jaroszowiec,** ul. Kolejowa 4/11, woj. Krakow
Oficisto, 25-jara, dez. korespondi tutmonde pri literaturo, moderna muziko, kino, teatro. Dez. interŝanĝi gramofondiskojn, bildkartojn, pm, alumetetikedojn. Mieczyslaw Porowski, **Opole,** ul. Dambonia 133/15
Geskoltoj dez. korespondi. Kontaktu D. H. Amikeco-Esperanto, pny Liceum Ekonomianym, **Gdansk-1,** ul. Sereynskiego.

Soveta Unio

Dez. korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo, interŝanĝas kol. bk L. Bartaševičius, **235030 Kedainiai,** P/K 30, Litovio
17 jara komencanto dez. korespondi pri sporto, muziko, literaturo, kol. bk Vitelmo Kutmaĥmenovu, **Ufa-65 (450065)** ul. Ševčenko, 3-82
Dez. koresp. pri ĉ. t., ĉefe pri filatelo, 48-jara, apotekisto. Eug. Inokaitiene, Soveta Unio, Litova SSR, **235045 Šeta**
Knabino, 22 jara, dez. korespondi kun GDR-ano, kol. bk, pm, diskojn kaj artisto-fotojn. Elvira Stanislauskaite, Kedainius, **235031 Medekŝiai,** Litovio
Docento, 30-jara, dez. korespondi kun kolektantoj de libroj, pm, bk kaj insignoj. Vladimir Telpiŝ, ul. Severo-zaradnaja 226/26, **Barnaul-50,** 656050

Herausgeber: Deutscher Kulturbund (Zentraler Arbeitskreis Esperanto der DDR). Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstraße 60. Fernruf: 22 59 91.
Verantwortl. Redakteur: Detlev Blanke, Redaktionskommission: Otto Bäßler, Dr. Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Willi Vildebrand.
Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf. – Druck: Druckwerkstätte Glauchau Julius Pickenhahn KG III-12-8 922